

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

NUMERO 272 (39) - KVINA EPOKO

FEBRUARO 1991



**ASSOCIACIÓ
CATALANA
D'ESPERANTO**



**KATALUNA
ESPERANTO-
ASOCIO**

(Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785)

Apartat/Postkesto 290 - 08200 Sabadell - Catalunya/Katalunio. Tel. (93)716.36.33 (ekde lundo ĝis vendredo inter la 20a kaj 22a h.). FAX (93)727.42.08. Kolektiva membro de Kooperativo de Literatura Folro. Kun laborinterkonsento kun la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino.

KOTIZOJ POR LA JARO 1991: Individua Abonanta Membro 1.600 p-toj; Individua Subtenanta Membro 3.200 p-toj; Individua Dumviva Membro 32.000 p-toj; Kolektiva Membro 3200 p-toj.

BANKO: Caixa de Pensions - agència 461 - Sabadell - konto: 550-53.

PLENUMKOMITATO DE KEA: Prezidanto: Antoni Grau; Vicprezidanto: Maria Nuez-Garcés; Ĝenerala Sekretario: Llibert Puig; Kasisto: Oscar Puig; Komitatanoj: Carles Berga, Bartomeu Costa, Josep Francesc, Jordi Graells, Joan R. Guinó, Girona Espero, Daniel Rubió, Josep M. Serrano.

KONTROLA KOMISIONO: Tomàs Alberich, Lluís Armadans, Ricard Jordana.

KATALUNA ESPERANTISTO: Hektor Alos, Ferriol Macip, Llibert Puig.

KONSERVANTARO DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ: Gabriel Mora i Arana (prezidanto), Jordi Carbonell i Pinyol, Timothy Brian Carr (florluda majstro), Manuel Casanoves i Casals, Bernard Golden (florluda majstro), Salvador Gumà i Clavell, Miguel Gutiérrez Adúriz, Abel Montagut i Masip, Giorgio Silfer (florluda majstro), Krystina Ungar (florluda majstro), Joan Ramon Guinó i Roset (sekretario).

FLORLUDAJ MAJSTROJ: Clarence Bicknell (3aj IFL, Olot 1913), Artur Domènech i Mas (6aj IFL, Reus 1916), Marià Solà i Montserrat (6aj IFL, Reus 1916), Josep Ventura i Freixas (8aj IFL, Olot 1921), Jaume Grau i Casas (9aj IFL, Manresa 1923), Bernard Golden (20aj IFL, Vilanova i la Geltrú 1980), Giorgio Silfer (24aj IFL, Olot 1984), Timothy Brian Carr (28aj IFL, Barcelona 1988), Krystina Ungar (30aj IFL, Palamós 1990).

PEDAGOGIA KOMISIONO: Lluís de Yzaguirre, Abel Montagut, Joan Torres, Josep Tordera, Manuel Marqués.

VORTARA KOMISIONO: Jordi Carbonell i Pinyol - av. Paralel, 96-6è - tel. (h) 329.24.81, (l) 241.94.11 - 08015 Barcelona.

KOMARKAJ DELEGITOJ: Alt Penedès, Baix Penedès, Garraf: Joan Inglada i Roig - St. Magí, 20-3r - tel. (93)893.71.76 - 08800 Vilanova i la Geltrú (Garraf); Garrotxa, Ripollès: Joan Torres i Nalda - Escola Llar - Ctra. de la Canya, s/n - tel. (972)26.38.29 - 17800 Olot (Garrotxa); Gironès, Alt Empordà, Baix Empordà, La Selva: Girona Espero - Apartat 509 - 17080 Girona (Gironès); Tarragonès, Alt Camp, Baix Camp: Josep M. Serrano - Apartat 482 - 43080 Tarragona (Tarragonès); Baix Ebre, Montsià: Josep M. Altadill - Berenguer IV, 23 - tel. (973)44.20.09 - 43500 Tortosa (Baix Ebre); Illes Balears: Xavier Margais i Basi - Orient, 60 - tel. (971)61.38.30 - 07110 Bunyola (Mallorca); Catalunya Nord: Joan Fernández - Henri Matisse, 21 - F-66000 Perpinyà (Roselló).

KOLEKTIVAJ MEMBROJ: Centre d'Esperanto Sabadell - Apartat 407 - Papa Pius XI, 130 - tel. (93)716.36.33 - 08200 Sabadell (Vallès Occidental); Centre d'Estudis de la Biblioteca-Museu Balaguer/Esperanto-Grupo - St. Gervasi, 45 - 08200 Vilanova i la Geltrú (Garraf); Centre Excursionista Puigcastellar/Esperanto-Grupo - St. Josep, 20 - 08922 Santa Coloma de Gramenet (Barcelonès); Club d'Amics de la Unesco de Catalunya/Departament d'Esperanto - Mallorca, 207-pral. - tel. (93)253.95.07 - 08036 Barcelona (Barcelonès); Esperanto-Centro Tarragona - Apartat 1236 - 43080 Tarragona (Tarragonès); Esperanto-Fako "S. C. Joventut Terrasenca" - St. Francesc, 52 - 08221 Terrassa (Vallès Occidental); Esperanto-Grupo "Jozefo Anglès" - Apartat 336 - 08190 Sant Cugat del Vallès (Vallès Occidental); Firma Tero Esperanto-Fako Centre Comarcal Lleidatà - Gran Via, 592 - 08007 Barcelona (Barcelonès); Grup Esperantista Sant Pau d'Ordal - Dr. Zamenhof, 12 - tel. (93)899.30.33 - Sant Pau d'Ordal (Garraf); Girona Espero - Apartat 509 - 17080 Girona (Gironès); Hispana Esperanto-Ferrovijista Asocio - Apartat 15027 - 08080 Barcelona; Secció d'Esperanto Centre d'Estudis Comarcals d'Igualada - Baixada de Sant Nicolau, 21 - 08700 Igualada (Anoia).

Dipòsit Legal: B-27362 - 1982. Presita ĉe Ràpid Graf. (93)725.50.91. Sabadell.

Redaktora angulo

Per la nova tekniko ni klopodas plibonigi la servojn de nia asocio kaj ĉefe nian bultenon. En ĝi vi trovos multajn novaĵojn: la aspekto diferencas, la enhavo pli buntas kaj eĉ ni regalas vin per kvar novaj paĝoj ĉi-foje. Iel tio respegulas la ioman plivigligon de nia aktiveco, kion vi rimarkos tra la sekvaj paĝoj. Sed ĉion ĉi oni povis sukcesi nur per grandaj fortostreĉoj, kaj tial la revuo iomete malfruigas. Post tiu sperto ni esperas pli glate daŭrigi, kalkulante je ampleksiĝo de nia kunlaborantaro.

Ĝuu la numeron kaj forlegu ĝin!

kasista alvoko

Por faciligi nian agadon, ni tre petas ĉiujn membrojn, kiuj ankoraŭ ne rajtigis nin perbanki sian kotizon, ke ili alvenigu ĝin al nia bankkonto aŭ postkestato (vd. ilin sur tiu paĝo) antaŭ la 1a de majo. Bankrajtigante nin enspezi vian kotizon vi ege faciligos nian elĉerpigan administradon.

Dua ebleco grave helpi nian asocion estas fariĝi ĝia subtenanta membro. Tiaj membroj pagas duoblan kotizon: t.e. nur 3.200 p-toj jare! Nia asocio faris grandan investon por informadikigo, kiu jam rezultas el pli vigla aktivado kaj baldaŭa aperado de novaj lernolibro kaj revuo:

helpu nin kreski per via kontribuo.

Girona

La loka grupo "Girona Espero en Asembleo okazinta la 20an de januaro skizis la estontan aktivadon tre volonte kaj decide. Ĝi komenciĝis per prelego la 20an de februaro, kaj la 4an de marto per nova elementa kurso gvide de Emili Aguilar. La grupo anoncas ĉiumonatan aranĝon: la 23an de aprilo surstratan libroludon okaze de nia Sant Jordi-tago, kaj la 12an de majo renkontiĝon de la tieaj esperantistoj. Detalajn informojn pri tiuj okazontaj aranĝoj nia Asocio volonte disponigos al ĉiuj petantoj.



tigi historian libreton pri la loka "Ronda Zamenhof".

Sabadell

Centro de Esperanto Sabadell asembleis la 22an de februaro kaj interalie aprobiĝis nova kotizo de 1.750 p-toj, estraranigo de Hektor Alos, Maite Cuello kaj Nùria Lacruz, kaj starigo de komisiono studonta la eblecon pre-

Kongresinformoj

Malgraŭ nia promeso en la pasinta revuo, ne eblas kun la nuna sendi al vi la kongresa-

ligilon kaj la unuan informilon, ĉar ĝis nun nenio konkreta konformiĝis pri la programo. La preparlaboroj tamen daŭras intense kaj tutcerte en nia aprila numero ni povos supersuti vin per abunda kaj interesa informado. Nepre memoru tamen, ke la 25a Kataluna Kongreso de Esperanto okazos en Tarragona inter la 1a kaj 3a de novembro kaj antaŭvidu vian partoprenadon.

Alvoko al ekologiemoj

Kiel konate, la franca verda partio "Les Verts", pro la meritplena agado de kelkaj samideanoj (Emile Mas, Jean-Luc Mermet k.a.) en sia lasta naĉa kongreso aprobis rezolucion favoran al la uzo de Esperanto en la rilatoj kun aliaj verdaj partioj. Tiu ĉi decido estas eksterordinare grava pro la ebloj de internacia poresperanta kunagado je politika nivelo, sed tute klare ĝi fiaskos se similan decidon ne akceptos minume unu alla verda partio.


Por tio necesas minimume unu esperantisto, kiu liveros al sia verda partio la necesajn dokumentojn, proponos la eventualan organizon de debatoj pri la lingva problemo, organizos kursojn por la partianoj ktp. Sed fakte, por esperantistoj kun ekologia sento, mi reliefigas la grandan utilecon membriĝi al sia verda partio. Kiel ano oni povas publikigi arti-

kolojn pri la lingva problemo en la partia gazeto, organizi debatojn ene de la partio, prezenti poresperantajn rezoluciojn, kontakti sampartianojn inkluzive de estraranoj kaj parlamentanoj ktp.

Por fariĝi vere fruktodona, tiu agado devas esti kunordigata internacie. Pro tio la subskribintoj de ĉi tiu alvoko aprobis bazan laborplanon, efektiveblan en ĉiu lando. Tiuj, kiuj pretas kunlabori laŭ siaj povoj, bonvolu anonci sin al Alberto Menabene (Via Monti Sibilini 3, I-00141 Roma).

Emile Mas (Francio)
Alberto Menabene (Italio)
Maire Mullarney (Irlando)

el **esperanto**, januaron 1991



Instruado

Meza kurso de Esperanto

Reprenante la sperton de iama kurso en Girono, KEJ organizas mezgradan kurson de Esperanto. La nivelo de la celatoj estas tiu de homoj lernintaj Esperanton dum ĉirkaŭ unu lernoĵaro (B-kurso de la Zagreba Metodo), kaj kiuj povas legi pli-malpli tekstojn de la dua nivelo de Kontakto.

Dum la kurso oni insistos pri paroligo de la lernantoj, profundigos iliajn gramatikajn konojn kaj prezentos gravajn elementojn de la internacilingva kulturo.

La kurso okazos dum tri semajnfinoj. La lernohorojn oni divididos inter la sabata posttagmezo (ekde 16h. - ekzakte!) kaj la tuta dimanĉo. La lernotagoj estos: 27a-28a de aprilo, 18a-19a de majo kaj 6a-7a de julio. Junie oni ne planas sesion pro la studentaj ekzamenoj. La loko estos la junulara gastejo de **Taragono**. Respondekas pri la kurso Hektor Alos.

La prezo estas 3.000 p-toj. Tio kompreneble ne entenas la restadajn kaj manĝajn kostojn, kiuj certe estos malaltaj. La lernantoj devos posedi lerno-materialon, kiu povas kosti ne pli ol kromajn 3.000 p-tojn. Parto de la lernolibroj estas la **Plena Vortaro de Esperanto**, acetenda por tiuj, kiuj ankoraŭ ne posedas ĝin aŭ PIV.

Kvankam KEJ organizas la kurson, estas kore bonvenigitaj

ankaŭ pli-aĝuloj. Oni tamen preferas elektos junulojn, se estas pli ol 15 lernantoj, kio estas la permesebla maksimumo.


Dezirantoj anoncu sin al la telefono (93)716.36.33 de la centra oficejo de KEA labortage de la 20h ĝis la 22h, laŭeble ĝis la 12a de aprilo.

Nova versio de la Zagreba metodo

Post plurjara sperto aktivuloj de nia asocio evoluigis novan eldonon de la fama Zagreba metodo. La nova versio esence estas la sama libro, sed oni enkondukis diversajn ŝanĝojn.

Unuflanke la revizio provas pli bone balancigi la materialon inter la lecionoj. Pluraj lecionoj, ĉefe inter la komencaj, enhavas senteble pli da materialo ol la ceteraj. La kompensigo de tiu fakto fariĝis per la dispartigo de kelkaj eroj en aliajn lecionojn (ekzemple la korelativoj vidiĝas tra kvar lecionoj anstataŭ pugno-frape en unu) kaj la kreo de du novaj lecionoj, kiuj transprenas materialon de aliaj.

Plej elstaras la adaptigo de la lernolibro al katalunlingvanoj. Certe la originalo estis pensita por kroatoj kaj tial diversaj tipaj problemoj por niaj lernantoj ne estis sufiĉe priatentitaj.



Aliflanke la tipo de kursoj, kiujn oni ofte organizas en Katalunio, ne estas la samaj kiel en Kroatio. Ĉe ni ja la kursoj estas vesperaj kaj longas plurajn monatojn, dum en Zagrebo ili regule estas semajnfinaj: dum tri tagoj oni travidas la tutan lernolibron en 24 lernohoroj entute. Pro tio niaj instruistoj kreis pliajn tre diversajn ekzercojn, kiuj sentiĝis absolute nepraj por la bona enkapigo de la nova materialo kaj subtenado de la malnova. La nova versio prezentas preskaŭ trioble pli da ekzercoj! Ili ja ne povas ĉiuj esti viditaj dum la lernohoroj, sed la nova eldono intencas doni ĉiajn ilojn por helpi la instruadon.

Kunlabor-peto

En la proksimaj semajnoj aperos provekzemplero dank' al la komputila tekniko de nia asocio. Ni ĝojos, se pliaj instruantoj bonvolos trarigardi la verkon antaŭ ĝia baldaŭa eldonado. Oni planas finan instruistan kunvenon por pritrakti la verkon dum majo.

La dezirantoj telefone petu ekzempleron de la verko al nia asocio.

Koresponda kurso pri Esperanto-literaturo

Ĉe Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds aperis "programita kurso kun testfolioj" pri la originala Esperanto-literaturo. Ĝin verkis Herbert Mayer, direktoro de Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno kaj motoro de la juna kaj viglega eldonejo Pro Esperanto. La kurso enhavas momente ses lecionojn, kiuj konsistigas ĝian unuan parton "ĝenerala enkonduko kun ekzemploj el la originala kaj monda literaturoj".

Laŭ la provleciono, kiun ni petis, la kurso estas taŭge elpensita kaj interesa. Ĝi prezentas enkondukon ne nur al la Esperanto-literaturo, sed diskutas ankaŭ ĝeneralajn beletrajn temojn. Post ĉiu paragrafo la lernanto devas respondi demandon, kiu kontrolas lian bonan komprenon. Post ĉiu leciono li devas resendi kompletigitan testfolion, dum atendas la korekton kaj la alsendon de la sekva leciono.

La kurso estas ja rekomendinda.

La originala Esperanto-literaturo; Herbert Mayer; KCE, 1987. 39 gld. (ĉ. 2.000 p-toj).

Kurs-adreso:

Postfach 28; A-1014 Wien;
Aŭstrio.

Junulara kurso en Barcelono

Ekde oktobro okazas en diversaj Barcelonaj ejoj elementa kurso pri Esperanto. Ekde decembro ĝi eksidis en komforta ĉambrego de trinkejo **El Glaciar** en placo Reial ĉiudimanche je la oka vespere. El dekkvino da lernantoj formiĝis diversaj grupetoj, kiuj havas apartajn nivelojn kaj ritmojn, kaj ankaŭ po unu instruanton. La kurso estas aparte interesa ĝuste pro tio, sed ankaŭ ĉar oni testas tuj eldonotan version de la fama **Zagreba Metodo**. Ĝi fariĝis eĉ regula am-uzejo de KEJ-anoj. Gapuloj bonvenaj!

CIRIT premias priesperantan studajon

En la bulteno n-ro 191-1990/2 de la KEA-grupo Centro de Esperanto Sabadell legiĝas informo pri la studaĵo prilaborita de la neesperantista loka studento Josep Manel Marco pri la temo "alveno kaj evoluo de Esperanto en Sabadell". La studaĵo elstaras pro la fakto, ke inter la dokumen-

toj ĝin komplementantaj, aperas originala letero de D-ro Zamenhof datumita je 1912-6-29, per kiu li dankas la lokan urbestaron pro ĝia decido nomi "Ronda Dr. Zamenhof" la ĝisnunan "Ronda Nord".

Tiu studaĵo estis prezentita fare de la aŭtoro kaj de lia lernejo -kiu fakte proponis ĝin kiel lernejan taskon- al la kunvoko de CIRIT⁽¹⁾, kiu celas instigi la junularan sciencan spiriton, kaj la studaĵo atingis premion en la historia branĉo.

La disdono de la premioj okazis en la salono "Sant Jordi" de la katalunregistara palaco "Generalitat" sub la prezido de ties prezidento Jordi Pujol, la 22an de dembro 1990a. Akompanis la aŭtoron dum la ceremonio Llibert Puig, prezidanto de la sabadella grupo kaj ĝenerala sekretario de KEA.

La premiitan studaĵon oni povas legi en la sidejo de Centro de Esperanto Sabadell.

lpg

(1) CIRIT - Comissió Interdepartamental de Recerca i Innovació Tecnològica (Interdepartamenta Komisiono pri Teknologiaj Esploro kaj Ennovaĵo)

Ni elkore dankas trinkejon
"El Glaciar"



KEJ agadas



Nova KEJ-prezidanto

La 9an kaj 10an de marto kunvenis asemblee dudeko de junuloj en trafega domo meze de la arbaro apud vilaĝo Orrius en Maresme. La kunvenoj okazis eĉ laŭlonge de la du tagoj en realisma sed laborema etoso. Oni serioze trajuĝadis la agadon de KEJ dum la pasinta jaro, eltirante valorajn konkludojn. Konsekvencas la planitaj taskoj de la junulara sekcio, kiujn ni povas taksu tre interesaj.

Elstaras, kiel servo por la membroj, la **mezaj kursoj de Esperanto**, pri kiuj ni informas aparte. La renkontigoj ne estos tiom oftaj kiel dum 1990, sed ja pli regulaj laŭ nivelo. Sekve okazos du renkontigoj (en sciataj lo-

koj, pri kiuj ni informos en Kataluna Esperantisto): **la 29an kaj 30an de junio kaj la 5an kaj 6an de oktobro**. Dum tiuj aranĝoj oni antaŭvidas praktiki Esperanton kaj ankaŭ interŝanĝi spertojn kun aliaj grupoj. Krome KEJ konfirmis sian plenan apogon al la ambicia projekto pri novtipa nacilingva informilo, kiun ĝi gvidas. Pri ĝi legu apude. Bedaŭrinde frostiĝis la re-funkciigo de la sopirata Kata Luno pro manko de laborfortoj.

El la organiza flanko gravegas la starigo de nova sankta triopo, kiu gvidos KEJ en sia nova etapo. Josep Virgili, iama aktivegulo de Girona Espero, fariĝis la nova prezidanto. Carles Vela, studento pri historio el Barcelono, estiĝis sekretario. Núria Ollé el Taragono devos ordigi la nepriskribeblan kas-kaoson en KEJ kiel nova monulino. Gemma Arma-

dans kaj Xavier Rodon respondecos pri la renkontigoj kaj Hektor Alos, Ferriol Macip kaj Josep Maria Milla redaktoros la katalunlingvan informilon. Kompreneble Josep Maria Milla plu funkciigos la imponan kaj uzategan informoservon (bv. ne sendi tiom da leteroj al nia fama poŝtkesto en Martaró pro saturigo!).

Kvankam tre labora, la sendorma aranĝo enhavis ankaŭ amuzigajn kaj amikecajn flankojn. Ĝi certe plaĉis eĉ al la plej ĝisostaj pom-manguloj, kaj entuziasmigis la ĉiamajn lingvemulojn, kiuj elpensis kazozan Esperanton, renormigis la kacalunan, parole sekretis en bulgaraj dialektoj kaj tute kompreneble babilis en la okcitana (aliel nomata nord-nord-kataluna kaj ekstrem-nord-valencia). Ĉiuj simple forgesis pri iu netuŝebla fundamento (fundam-unto, ĥore oni dirus!).

Freqüências: nia nova katalunlingva revuo

Delonge Kataluna Esperanto-Junularo planas eldoni sian propran katalunlingvan bultenon. Ĝi eĉ havas nomon de kelkaj jaroj (**freqüências**) kaj iam oni muntis eĉ provekzempleron, kiu ne eldoniĝis. Eble tro severa recenzo fiaskigis tiam la projekton. Sed ĝuste la ega zorgo estas, laŭ la novaj respondeculoj pri la eldoniĝo, la nura vojo al sukceso.

Fakte la panoramo de la Esperantaj revuoj en nia lando ne estas ĝojiga. Ili ofte terure aspektas kaj prezentas eĉ pli plorigajn enhavojn, klopodande nur pleniĝi la necesajn paĝojn. Cetere tiuj periodaĵoj parolas pri la ĉiamaj verdaj temoj, prezentitaj laŭ la ĉiamaj vidpunktoj.

La nova **frekŭencies** volas esti radikale diversa. Unue ĝi celas neesperantistan publikon, kaj tial ĝi speciale prizorgos la aspekton kaj enhavon. Due ĝi celas ne ĉefe informi pri Esperanto, sed prezenti la interesojn kaj valorojn de la junaj esperantistoj. Tial, se ili interesigas pri la vivo de la normalaj homoj dise tra la mondo, pri etnaj kaj lingvaj problemoj, pri lingvikaj temoj, la revuo informos ĝuste pri tiaj temoj. Iam kaj iel la revuo povos prezenti ankaŭ rekte verdajn faktojn, kiel tradukitajn rakontojn el Esperanto aŭ novajn interesajn alrigardojn al la Esperanta komunumo.

La redaktoroj asertas eĉ, ke estas sufiĉe da materialo je ilia dispono, por pleniĝi plurajn revuojn... fakte revuegojn, laŭ niaj ridinde provincaj parametroj, ĉar temas ja pri kvar tridekdu-paĝaj numeroj jare. Ili jam ekstarigis reton de solidaj kunlaborantoj.

Fakte tiu plano vekis grandan intereson ene de nia movado. Tial, kvankam la iniciato estis de KEJ, jam Girona Espero kaj Centro de Esperanto Sabadell akceptis abonigi sian tutan membraron al la revuo, por certigi minimuman eldon-bazon kaj helpi ĝian disvastigon inter la malsteluloj.

La unua numero aperos jam dum aprilo. Petu senpagan prov-ekzempleron al nia asocio!

haf

Arnau Torras tra Eŭropo kaj Balkanoj



Nia sopirata aktivulo kaj amiko Arnau Torras forvojaĝis Eŭropen en oktobro por plurjara vago. Armita de hoteligita ŝarĝaŭto, li fulmis Germanien, poste nederlandumis, parizis, berlinadis. Dum IS li estris la drinkejon, poste li ripozis en Bonn. Sed li nelonge vegetis en sama ŝtato. Li ekiris en Ĉeĥo-kaj-Slovakio, kie li skiadis dum semajno kaj frostaciis kvazaŭ polusa urso. Netrovinte laboron en Aŭstrio, laste li hejmas en Budapeŝto ĉe Attila (la ne tiom fama, tamen). Spertaj arnaŭologoj antaŭvidas malrapidan elmigran suden tra Zagrebo (diablo scias, al kiu ŝtato ĝi apartenos tiam!), direkte al Atena inujaro, sen Bulgariaj kurbigoj sed eble ja Rumaniaj (nu, estas survoje, ĉu ne?).

Li bonvenigos leterojn. Lia poŝtkesto plu estas lia Sabadella eksadreso.

Rok' gazet'




Lastatempe aperis nova revuo: "Rok' Gazet'". Ĝi okupiĝas pri rokmuziko en Esperanto kaj pri ĝia ĉirkaŭo. La eldonisto estas "Eurokka", asocio, kiu zorgas pri la diskonigo de esperanta muziko.

La gazeto ege belaspektas kaj estas plenplena de fotoj kaj ilustraĵoj; ĝi enhavas raportojn, artikolojn, intervjuojn al gekantistoj aŭ grupoj, recenzojn pri novaj diskoj, anoncetojn ktp... krome enestas sekcio por kontaktoj inter muzikemuloj.

Ĝi aperas kvarfoje jare, kostas 1600 ptojn, kaj nia asocia libroservo peros vian certan abonon.

Dani Rubió

Frekŭencia'ns al Frekŭencies



Goja

kaj utila tempo en Katalunio



En la stacidomo de Sabadell atendis min s-ro Libert Puig, sekretario de Kataluna Esperanto-Asocio. Post longa kaj malfacila vojaĝo de Alacant al Sabadell, lia ridanta mieno kaj granda akceptemo forĝis al mi tiujn malfacilaĵojn. Per sia malgranda kamioneto li kunportis min kaj mian grandan valizon al sia domo, kie atendis nin lia edzino, Carme. Dum mia unu kaj duon monata restado en Katalunio, mi tre ofte revenis al Sabadell, kaj post kelkaj tagoj denove ekiris al nova urbo. Carme ĉiam dum mia restado en la domo bone kaj patrinece zorgis min malgraŭ la fakto, ke ŝi laboras ekstere. Ŝia ĉefa hobbio estas pentri naturpentraĵojn. Por mi estis surprizo konstati, ke ĉiuj kvar gefiloj de s-ro Puig estas Esperanto-parolantoj.

Laŭ la programo mi vizitis ĉiujn kvar provincojn de Katalunio, prelegante ĉefe pri Irano kaj ties popolo kaj kulturo. Dum miaj vizitoj multfoje mi estis intervjuata de amas-komunikiloj kaj kelkfoje

mia voĉo estis elsendita el radiostacioj. En Sabadella loka televidstacio, kies programoj i.a. ankaŭ en Barcelona estas kaptablaj, faris intervjuon al mi kaj ĉirkaŭ kvar-foje elsendis ĝin. Tie mi ĉefe parolis pri Esperanto, mia Esperanto-kurso en Sabadell laŭ la rekta metodo kaj Olimpiko en Barcelona en 1992.

Menciinde, ke en Katalunio mi fakte sentis min hejme pro tio, ke la karaktero kaj viv-maniero de katalunoj en pluraj aspektoj similas al tiuj en mia lando, kaj varmaj kaj sinceraj Esperantistoj ĉiam bone akceptis kaj bonvenigis min.

Alia neforgesebla afero por mi estis viziti tiom da belaj lokoj. Dum unu ekskurso kun sepo da Esperantistoj mi povis dum kelkaj tagoj grimpi plurajn belajn montojn. En nia grupo troviĝis ankaŭ belgo, kiu edziĝis al katalunino kaj nun loĝas en Sabadell. Eric eĉ estas estrarano de la loka klubo kaj instruas Esperanton. Intere, ke tiuj geedzoj krom Espe-

ranton parolas ankaŭ siajn du naciajn lingvojn: katalunan kaj francan!


En Eŭskio

KEA bone organizis ankaŭ mian vojaĝon al Eŭskio. Tie mi konatiĝis kun pluraj junaj esperantistoj, kiuj fervore movadis. Mi hazarde trafis lokan feston en Vitoria (Gasteiz), ĉefurbo de Eŭskio, kaj dum tri tagoj diversaj kulturaj kaj distraj programoj estis okazigitaj. La ĉefa motoro de la Esperanto-movado en Vitoria estas s-ro Iñaki, kiu gvidas kurson kaj redaktas bultenon. Iñaki kaj liaj samideanoj forte interesiĝas pri siaj nacia lingvo, kulturo, vivmaniero.

Ĉiuokaze mia restado kaj vojaĝo en Katalunio kaj Eŭskio estis tre utilaj por interalie koni iliajn movadojn kaj kulturojn, kaj samtempe konatigi miajn al ili.

M. Reza Kheyir-Khan
(Irano)

Farigu subtenanta membro de KEA



Ĉu d-ro

Zamenhof havis polan naciecon?

En la februara (1990) numero de **Kataluna Esperantisto** aperas sur pĝ. 3 "inaŭgura raporto de la Zamenhof-monumento en Sabadell. Substrekinda estas jena frazo en la lasta alineo: "Memorinda tago, kiu havis tamen kelkajn negativajn (...) laste, sed plej grave, la interpretadon dum la ceremonio kaj la paroladon dum la tagmango, ambaŭ fuŝaj [tiele!] kaj neekzempligaj [tiele!] (...)".

En n-ro 14 (vintre de 1990) de **Informilo** de Kultura Asocio Esperantista (KAE) troviĝas detala raporto kun fotografajoj pri la evento, kiu okazis en Sabadell la 17an de decembro 1989 (vd. pĝ. 2-6). Altiris mian atenton jena frazo sur pĝ. 4: "D-ro Ulrich Lins, en sia parolado pri-Esperanta (...) memorigis la Polan naciecon de D-ro Zamenhof (...)".

Ĉar la atribuo de pola nacieco al d-ro Zamenhof estas grava eraro, mi petis s-ron V. Hernández Llusera, la aŭtoron de la raporto, konfirmi la vortojn de d-ro Lins. Li informis min, ke lia artikolo en **Informilo** estas traduko de la publikigita raporto de la ĵurnalisto Josep Ache, kiu aperis en **Diari de Sabadell**. S-ro Hernández Llusera kompleze sendis al

mi eltondaĵon de la gazeto (mardo, la 19a de decembro, 1989, pĝ. 10) kun la kataluna teksto: "El Dr. Ulrich Lins (...) recordà la nacionalitat polonesa del Dr. Zamenhof (...)".

Ĉar D-ro Lins estas nuntempe la plej eminenta historiisto de la Esperanto-movado, mi ne povis kredi, ke li vere diris, ke Zamenhof havis polan naciecon. Mi, do, perletere petis lin klarigi tiun frazon de la raporto en la sabadela gazeto. Returnpoŝte li informis min, ke la raportisto miscitis liajn vortojn. Efektive, kulpis ne la ĵurnalisto, kiu ne komprenis la esperantlingvan paroladon, sed la persono, kiu respondecis pri interpretado en la kataluna lingvo.

Objektive pruvebla estas la fakto, ke Zamenhof ne estis polo. La plej konvinka argumento venas el la plumo de la aŭtoro mem de Esperanto. En letero sendita la al la Loka Kongresa Komitato en Krakovo la 14an de februaro 1912, Zamenhof skribis: " (...) ne nomu min "polo" por ke oni ne diru, ke mi -por akcepti honorojn- metis sur min maskon de popolo, al kiu mi ne apartenas (...) laŭ mia deveno mi alkalkulas min al la gento **hebrea**."

Krom tiu eldiro de Zamenhof, ekzistas ankaŭ dokumentaj atestaĵoj pri lia judeco, ekzemple fotografajoj de la originala naskigatesto kaj publikigitaj transskriboj kaj tradukoj de oficialaj ruslingvaj dokumentoj kaj leteroj, identigantaj Zamenhof kiel judon. Kiel loĝanto de la urbo Bjalistoko kaj poste Varsovio, ambaŭ en pola etnografia teritorio, Zamenhof estis pollandano, **ne polo**. Laŭ oficiala kaj politika vidpunktoj li estis regato de la cara registaro de la Rusa Imperio. Neniu havis polan civitanecon tiutempe, ĉar la sendependa pola ŝtato estiĝis nur post la unua mondmilito. Zamenhof mortis en 1917.

Kial, do, oni senĉese insistas, ke Zamenhof estis polo? Mi ne povas trovi alian kialon ol tiu ĉi: ĝi estas artifiko por kaŝi la veron, por prisilenti lian judecon. Ne temas pri imagita aŭ hazarda agado. En la "Enkonduko" de **La Kaŝita Vivo de Zamenhof** de N. Z. Maimon, prof. Waringhien tuŝas ĝuste tiun demandon, menciante okazajn de cenzurado de faktoj pri la genta origino de Zamenhof en publikigaĵoj, ekzemple **Enciklopedio de Esperanto**. Antaŭ kelkaj jaroj mi ricevis leteron de la redaktoro de la Esperanto-revuo de landa organizaĵo, kiu informis min, ke li **Intence** ne parolas pri "la juda okulkuracisto" la "juddevena aŭtoro de Esperanto", kaj kiam li instruas Esperanton, li tute forlaŝas la fakton, ke Zamenhof naskiĝis judo.

Bonsance kaj saĝe Zamenhof inkludis en sia **Proverbaro** jenan diraĵon: "eĉ el sub la tero aperas la vero". Estas, do, nerefutebla la konkludo, ke Zamenhof ne estis polo sed judo.

decembron 1990
Bernard Golden

Libro-servado **novaj tendencoj**

La libroservo estas unu el la plej klasikaj agadoj, kiun ofertas iom grandaj lokaj grupoj al la Esperanta komunumo. En la plej felicitaj okazoj, ĝis nun, temis pri sporto de sentema aktivulo, kiu ĉasadis la aperantajn novaĵojn en nia merkato, serĉante ion allogan kaj ne tro kostan. Certe la prezoj estas grava malavantaĝo por ni, ĉar unflanke la Esperantlingvaj libroj estas minoritataj, kaj sekve malmultekzempleraj kaj multekostaj; kaj aliflanke la plimulto de la libroj estas eldonitaj en landoj kun pli alta vivnivelo (kaj salajroj) ol la nia, kiel Nederlando, Svislando aŭ laste Aŭstrio. Eĉ en Hungario oni eldonas je similaj prezoj por elteni sian tutan potencon Esperanto-asocion.

Kontraŭ tiuj fundamentaj problemoj estas neeble por ni batali. Sed estas multe pli gravaj faktoj, kiuj donas al ni ian esperon. Ĉefe estas tio, ke la normalaj esperantistoj aĉetas neniun libron, ĉar ili ne havas sufiĉajn informojn pri la valoro kaj legebleco de la verkoj. Bedaŭrinde dum tro multaj jaroj estis nenia eduko pri literaturo, kaj ekzemple oni ne konas, kiuj estas la facilaj aŭ amuzaj klasikaj verkoj en nia lingvo. Tiajn verkojn devus koni ĉiu esperantisto... kaj des pli **devus ilin posedi ĉiu Esperanto-grupo en sia biblioteko!**

Nia unua klopodo estis kunigi la ofertojn de la tri ĉefaj libroser-

voj en Katalunio: Sabadell, Klubo de Amikoj de Unesko, Ĝirone kaj tiu de KEA mem. Per tio ni antaŭvidas povi plilargigi la oferton almenaŭ en la tri lokaj ĉefurboj de nia komunumeto.

Sed ĉefe ni sentas, ke nia plej grava problemoj estas la nekono de la esperantistoj pri la valoroj de nia literaturo, eĉ pri klasikaj verkoj. Sed ne timu la vorton literaturo! Estas ja tute amuzaj verkoj, kaj relative facilaj, kiuj ne povas timigi eĉ la plej ĝisostan eternan komencanton... Nu, eble tio estas iom tro. Ni menciu, eble, la bonegajn **kredu min, sinjorino** de Cezaro Rossetti (ne konfuzu ĝin kun la fama fivortaro **kredu min, sinjorino** de la similnoma Renato Corsetti), aŭ la same (fi)faman **ĉu ŝi mortu tra-fike** de Johano Balano, aŭ la pikajn rakontojn de **Beaucaire**. Ĉu vi ne aŭdis tiujn nomojn?! Ne gravas. Por vi aperas tiu ĉi rubriko en nia revuo...

Kaj ni, cetere, ankaŭ atentus ĉi tie la revuojn, diskojn, kasedojn kaj vidbendojn, kaj tre speciale la instruajn seriojn de la eldonejoj kun romanoj por komencantoj kaj progresantoj.

haf

Internacie kuiri

Nepra libro en biblioteko de esperantista kuiremulo, ĝi estas

kolekto de pli ol cent receptoj aperintaj en la paĝoj de **monato**. La devenoj de tiuj receptoj vere pravigas la titolon, ĉar la verko entenas pladojn el (preskaŭ) la kvin kontinentoj, sed precipe eŭropajn.

Kun prologo de Marjorie Boulton, praktika mezurtabelo kaj tre interesaj konsiloj pri sana nutrado kompletigas la libron, al kiu mankas eble glosaro (ja ne multaj esperantistoj sufiĉe konas la kuirejan terminaron).

Ne taŭga por verduloj aŭ diet-suferantoj.

pmb

- **Internacie kuiri**; redaktis Maria Becker-Meisberger; eld. Flandra Esperanto-Ligo; 192 paĝoj; DIN A5.

vojaĝoj finiĝas, amantoj kunigiĝas

Romano pri jaro el la ĉiutaga vivo de irlanda adoleskantino, kies patrino denove edziniĝas post la morto de ŝia patro. En sia nova hejmo Maureen trovas ne nur novan familion, sed ankaŭ la unuan amon.

Milda, romantika verko, plenkona de bonkoraj homoj kaj obeemaj gefiloj. Ideala por ke la leganto reakiru perditan konfidon al la homaro.

Facila, glata kaj flua lingvaĵo. La libro legiĝas senpene.

pmb

- **vojaĝoj finiĝas, amantoj kunigiĝas**; Manjo Austin; eld. Flandra Esperanto-Ligo; 128 paĝoj; DIN A5.

Tabuaj Vortoj en Esperanto

Aro da fivortoj, slangajoj, insultoj, invitaĵoj foriri brave kolektitaj de kataluno kaj bulgaro en fakfikeca fivortaro nepre havenda por junulare kongresumi.

Ĝi inkludas krom vortareton, sinonimojn kaj metaforojn, slangojn kaj vortludojn, esprimojn kaj sakrojn, insultojn, invitaĵojn foriri, mal-esprimojn kaj pikan poezion. Inter la pika poeziaro estas kelkaj el la majstregaj Sekretaj Sonetoj de Peter Peneter.

Estu atentaj ĉar ĝi kutimigas la leganton fiparoli kaj vortludi

fmb

La lingvoj de la mondo

En la malkontentiga panorama de la prilingvaj libroj en la kataluna, ofte sentigas manko de popularigaj verkoj. Ĝuste tio estas la celo de tiu interesa verko de Carme Junyent. Ĝi diskutas kaj trafe prezentas kelkajn temojn, kiuj estas la kerno de la lingvoscienco: kio lingvas kaj kio dialektas, kiaj estas la rilatoj inter lingvo kaj nacio, inter lingvo kaj kulturo, inter lingvo kaj literaturo k.a. Fine la libro rapide enkondukas al lingvo-klasigado, kaj donas arbo-strukturojn por la ĉefaj lingvo-familioj.

Tiuj temoj estas tre plaĉe kaj facil-lege prezentitaj. La klarigoj estas tre interesaj, kaj pro la ĝeneraleco oni preskaŭ ĉiam akceptas la vidpunkton de la aŭtoro. Aliel foje okazas dum la rapida klasifikado, sed tio ne plu estas la esenco de la verko.

Ege leginda por neprofesiaj lingvemuloj.

haf

- **Les llengües del món;** M. Carme Junyent; biblioteca universal Empúries, 1989; 160 paĝoj (kun indeksoj); 20 cm.

Ni laste ricevis

- **La bona lingvo;** Claude Piron (1931-); Pro Esperanto, 1989; 112 p. 21 cm. 800 p-toj. La plej diskutita libro nuntempe en Esperantio. La krudaj opinioj de senta lingvouzanto kaj verkisto.
- **Ĉu ŝi mortu tra-fike;** Johán Balano (pseudonimo de Claude Piron; 1931-); TK/Stafeto, 1982; 96 p. 21 cm; 800 p-toj. Priseksi krimromaneto en fluega lingvo.
- **Dankon, amiko!;** Claude Piron (1931-); Pro Esperanto, 1990; 40 p. 21 cm. 500 p-toj. **Novajo.** Rakonto pri junulaj aventuroj. Perfekta por homoj, kiuj finis sian unuan Esperanto-kurson.
- **La dekdu noktoj de Satano;** Kálmán Kalocsay (1891-1976); LF-Koop, 1990; 132 p. 21 cm. 2.500 p-toj. **Novajo.** La plej sekreta verko de nia plej granda lirikisto. La pornografia poemo **la eksmonaĥino** mildiĝas en la fajna am-novelo **la dektria nokto.**
- **El la vivo de bervalenta ŝantaŭgulo;** Louis Beaucaire (1925-1983); Stafeto, beletraĵoj kajeroj n-ro 46, 1974; 136 p. 19 cm. 800 p-toj. Dek du maldecaj epizodoj en tre flua lingvo de unu el niaj plej popularaj originalaj prozistoj. Traduko de la unua ĵus premiigis en la 30aj Internaciaj Floraj Ludoj.
- **Enlumas min senlimo;** red. Carlo Minnaja; LF-Koop, 1990; 274 p. 21 cm; 2.400 p-toj. **Novajo.** Itala poezio de la dudeka jarcento tradukita de impona plejado.
- **Fabeloj de la verda pigo;** Louis Beaucaire (1925-1983); ilustris Stano Marković; TK/Stafeto, 1981; 112 p. 21 cm. 1.000 p-toj. Spritaj fantaziaj rakontoj kun Esperantaj temoj.
- **La ĵaro 1991;** red. André Cherpillod; Monato, 1990; 168 p. 14 cm. 400 p-toj. Internacia kalendara poŝnotlibro kun multaj aldonaj informoj.
- **Libro de amo;** (pseudonimo) Kálmán Kalocsay (1891-1976) kaj Gaston Waringhien (1901-); Byblos, 1969 (fotopreso 1979); 264 p. 20 cm. 1.000 p-toj. Ĝi enhavas la famegajn **sekretajn sonetojn** (XXXV: "Por la unua dolĉa foj': deflori,/ kaj poste: nupti, karnon miksi, trui..") kun ties "komplezaj klarigoj" (rimforma erotika terminaro), tradukoj kaj parodioj de la verkoj de J. M. de Heredia (**la trofeo, la trofioj**) kaj multe pli.
- **Plena analiza gramatiko;** Kálmán Kalocsay (1871-1976) kaj Gaston Waringhien (1901-); UEA, 1985 (kvina korektita eldono); 600 p. 22 cm. 2.500 p-toj. Monumenta trastudo pri la internacia lingvo. Havenda dokumento por ĉiu Esperanto-grupo.
- **La spegulo de Velodajo;** Giorgio Silfer (1949-); ilustris Stella Agostini; LF-Koop, 1990; 32 p. 30 cm. 700 p-toj. **Novabold romano.** Fantasta rakonto de unu el niaj plej elstaraj aŭtoroj.
- **Tabuaj vortoj en Esperanto;** Hektor Alos (1965-) kaj Kiril Velkov (1945-); Vraca, 1991; 32 p. 14 cm. 300 p-toj. **Novajo.** Vortaro kun ekzemploj de praktika uzado pri fi(k)vortoj en Esperanto, insultoj k.s. kun literatura apendikso.

Kiom ĝeneralaj estas viaj scioj?

En nia instruado de Esperanto ni unue volas instrui la lingvon mem - la gramatikon, la strukturojn, ĝian filozofion kaj ankaŭ ĝian realan uzadon. Kompreneble, ĝia propra kulturo, historio kaj literaturo ankaŭ gravas, sed ni povas iri paŝon pli kaj apliki la lingvon por vastigi aŭ testi la konojn de lernantoj sur diversaj terenoj. Farante tion, la lernantoj spertigas en la lingvo apenaŭ rimarkante tion.

Jen la filozofio malantaŭ nova potenciala eldonaĵo, 32-paĝa libreto ĝeneralaj scioj, eldonpreta jam de majo en **International Language School (ILS)**, Baycsy-Zsilinszky 62, H-1363 Budapeŝt. Ni reproduktas kelkajn el la paĝoj specimene. La misteraj kodoj sube gravas ĉar la libreto estas destinata aperi en 6-lingva serio **look sharp** en kiu jam pretas kvardeko da libretoj. La testlibroj oni povas uzi kun komputiletoj ĉu hejme, ĉu en memstuda centro de ILS ĉe la supra adreso. La testoj estas krome fareblaj tra la hungara **Teletext**.

La komputila programo kontrolas la respondojn, mezuras la tempon kaj pritaksas la rezulton ekrane aŭ skribe. La internacieco de la projekto devigas neuzon de Ĉ por indiki la kvaran el la kvar alternativoj A, B, C, kaj D el kiuj oni devas elekti la ĝustan.

Sed la libreto suferis, kune kun tri alilingvaj libretoj, longajn prokrastojn kaj nur novembre atingis presejon. Eble ĝis la jarfino aperos kaj devus kosti 55 ft. Legantoj de Budapeŝta Informilo estas invitataj provi la testojn, kaj se ili trovas la ideon interesa,

Elektu la plej taŭgan el la kvar donitaj respondoj:

1. Pri kiu rivero verkis Mark Twain?

A: Missouri. C: Mississippi.
B: St. Lawrence. D: Yukon.

2. Kiu estas la nomo de la plej fama monto en Japanio?

A: Origami. C: Yamaha.
B: Honŝu. D: Fuji.

3. Kiun faman detektivon helpis Doktoro Watson?

A: Maigret. C: Sherlock Holmes.
B: Hercule Poirot. D: James Bond.

4. Kie vivis la pra-aztekoj?

A: Peruo. C: Meksikio.
B: Kolombio. D: Gvatemalo.

5. Kiom da flankoj havas pentagono?

A: Kvin. C: Sep.
B: Ses. D: Ok.

6. Kiom da lingvoj ekzistas en la mondo?

A: Proksimume cent. C: Proks. tricent.
B: Proksimume mil. D: Pli ol trimil.

7. En kiu oceano troviĝas Nov-Zelando, Havajo kaj Filipinoj?

A: Hinda Oceano. C: La Atlantika
B: Pacifika Oceano. D: La Antarkta

8. Ĉu prahistoriaj homoj iam renkontis dinosaŭrojn?

A: Jes. C: Eble.
B: Ne. D: Ankoraŭ ne pruvite.

9. Kiel finiĝas la proverbo: "Ne ŝovu nazon en fremdan...?"

A: frazon. D: bazon.
B: vazon. D: kazon.

10. En kiu urbo naskiĝis Zamenhof?

A: Varsovio. C: Londono.
B: Bjalistoko. D: Moskvo.

11. Kiu estas la plej granda lando en la mondo?

A: Ĉinio. C: Sovet-unio.
B: Usono. D: Brazilo.

12. En kiu urbo okazis la Unua Universala Kongreso de Esperanto?

A: Boulogne-sur-Mer. C: Varsovio.
B: Parizo. D: Londono.

13. Kiujn kolorojn oni miksu por krei verdon?

A: Ruĝon. C: Flavon kaj bluan.
kaj bluan D: Flavon kaj ruĝon.
B: Nigran kaj blankon.

14. Per kio oni enbatas najlojn?

A: Segilo. C: Tondilo.
B: Ŝraŭbilo. D: Martelo.

15. Kiu eŭropa lando havas tri oficialajn lingvojn kaj dulingvan ĉefurbon?

A: Svislando. C: Svedio.
B: Hispanio. D: Belgio.

16. Impoŝto estas termino.

A: muzika. C: skulptista.
B: arkitektura. D: financa.

17. En kiu lando troviĝas la prauinoj Stonehenge?

A: Britio. C: Francio.
B: Belgio. D: Nederlando.

18. Kiu verkis la poëmaron "Streĉita kordo"?

A: Julio Baghy. C: Ludoviko Zamenhof.
B: Kobmano Kalocsay. D: Anton Grabowski.

Test-numero:ZAK1 ID:242 Kodo: Fe85YF601

skribi instigan leteron al ILS en Esperanto, la hungara aŭ iu ajn eŭropa lingvo, por ke ĝi sentu, ke estas merkato por esperantaj test-libroj; eventuale eĉ provu mendi ĝin. ILS principe petas aperigi pliajn test-librojn se estos

aĉetontoj; en preparo estas testlibro por helpi kandidatojn pretiĝi por la elementaj kaj mezaj ekzamenoj de UEA/ILEI.

el **Budapeŝta Informilo**, 11-12/1990